Adriaen (François) Valéry,

# Wilt heden nu treden

Wilt heden nu treden voor God, den Heere,
Hem boven al loven van harte zeer,
En maken groot zijns lieven namens eere,
Die daar nu onzen vijand slaat terneer.

Ter eeren ons Heeren wilt al uw dagen
Dit wonder bijzonder gedenken toch.
Maakt u, o mensch, voor God steeds wel te dragen,
Doet ieder recht en wacht u voor bedrog!

Bidt, waket en maket, dat g'in bekoring
En 't kwade met schade toch niet en valt.
Uw vroomheid brengt den vijand tot verstoring,
Al waar' zijn rijk nog eens zoo sterk bewald!

*Verkinto de tiu ĉi Nederlanda poemo estas* ADRIAEN (FRANÇOIS) VALÉRY *(Adrianus Valerius, ∗1575 – †1620-01-27), publikigita 1597.*

*Arg-528-1046 (2010-08-15 19:38:38)*

*La verkinto Adriaen (François) Valéry, kiu poste alprenis la latinigitan nomon Adrianus Valerius, estis filo de franc-devena nederlanda militista skribisto kaj notario, kiu en 1569 fariĝis civitano de la nederlanda urbo Middelburg. Vidu ankaŭ la retejojn* http://www.hymntime.com/tch/non/foreign.htm?nl/wilthede.htm, http://www.cyberhymnal.org/non/nl/wilthede.htm, http://ingeb.org/spiritua/wirtretz.html, http://de.wikipedia.org/wiki/Adriaen_Val%C3%A9ry *kaj* http://www.hymntime.com/tch/non/foreign.htm?nl/wilthede.htm.

Adriaen (François) Valéry,

# Kristana kanto

*tradukita de Karl Vanselow*

Al Dio, la lumo de nia espero,
Aŭdiĝu la kanto de nia ador',
Al Dio ni preĝu kun pia sincero,
Ke benu kaj ŝirmu nin Lia favor'.

Li montru la vojon, Li gvidu la sorton
Al suna estonto tra ĉiu nubar',
Al niaj animoj Li donu la forton
Por venki malamon de malamikar'.

Al Dio ni preĝu kun kredo kaj pio,
Al Dio ni fidu kun kora ador'.
Leviĝu ĉielen la melodio
De nia kantado por Lia honor'.

*Traduko de la Nederlanda poemo "Wilt heden nu treden" de* ADRIAEN (FRANÇOIS) VALÉRY *(Adrianus Valerius, ∗1575 – †1620-01-27) en Esperanton de* KARL VANSELOW *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-528-1050 (2010-03-24 10:05:00)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 64. Sub la teksto estas indikita: (Verkita laŭ la nederlanda melodio "Wilt heden nu treden". Originalan melodion kreis Rolf W. Althoff.) - Pri la aŭtoro Karl Vanselow legeblas informoj en* http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow.